

BOULOGNE-SUR-MER  
31, Boulevard Mariette

TÉLÉPHONE 0.68

Kara Samideano.

Fine mi vidis vian konatan manskribon + ĝojis. Vere, mi estas rekompensita ĉar tiu letero via estis la plej bela el ĉiuj kiujn vi skribis. Grandegan dankon. Mi ~~vin~~ ankaŭ devas danki vin por ambaŭ P.K. kie vi staras.

En tiu de la Opera, vi certe ne estas bone sukcesigita. En tiu de la "foot-ball", vi ŝaj- aspektas pli bone.

Sed kiu estas tiu stranga kostumo en la Opera? Al mi ŝajnas pordisto en monaĥinejo!! Kaj kial vi ne portas kolumon + la aliaj havas ĝin?

La fraŭlinoj ŝajnas beletaj + iliaj haroj bele aranĝitaj. Vere, tiu kostumo ne beligas vin.

La alia plaĉas al mi + mi gratulas vin multege pro via sukceso. Tiu estas bela grupo + tre simpatia. Estas vi, mia kara Samideano, la plej modesta el ĉiuj tiuj "Old boys" ĉar vi apenaŭ montras viajn genuojn. Vi aspektas pli maldika en tiu kostumo. Al mi ŝajnas ke ofte en via lando oni estas senhara – vidu en tiu grupo da 13, oni vidas 5 sen haroj !!!

Vi certe pensos ke mi estas tro observemulino – sed ne estas mia kulpo. Miaj okuloj vidas ĉion, eĉ la plej pli malgrandan detalon. Vi devus ludi ofte tiun sporton – estus pli sane por vi ol ludi muzikon.

Fine, mi ricevis P.Kjn + leteron de S<sup>ro</sup> Sibrava el Znojmo + li jam prenis sian aliĝilon por la Nürenberga Kongreso kie li esperas vidi min. Sed en kiu ĵurnalo oni povas ricevi sciigojn pri tiu Kongreso ? Eble en "Esp. Triumfonta". Ĉu vi konas la adreson de tiu gazeto ? Se jes, estu ĝentila + sendu ĝin al mi kun la prezo en markoj de la abono + mi tuj aboniĝos.

Jes, vere estos tre tre agrable de nove vin renkontiĝi ... 2 jaroj pli maljunaj ... "tout passe" ..... Ĉu via edzino povos lasi la infaninon + veni? Mi ĝojas ke ili ambaŭ fartas bone.

Eble mi baldaŭ iros de nove al Parizo + mi vidos S<sup>ron</sup> Legrand kiu pasigos la tutan vintron en "la Ville Lumière". Tion skribis al mi S<sup>ino</sup> Zamenhof. S<sup>ro</sup> Legrand tradukis "Amfitriono" de Molière + sendis la libron al mi. Tre lerta homo.

Kial vi pensas ke mi ricevas vian leteron en la 1<sup>a</sup> etaĝo ĉe mi. Fakte, tiun fojon (+ ofte) estis juste, ĉar mi estis en mia dormĉambro. En nia hejmo ekzistas la subtera etaĝo kie estas lokoj + ĉambroj por la vino, la karbo, la lignaĵo, la hejtaparato por la tuta dormo, la lavejo por la tolaĵo, ĉambro por ĝardenaj aferoj, + multe da aliaj liberaj lokoj. Sur la teretaĝo, estas sur la strato nia manĝĉambro tute ruĝa. Malantaŭe, la kancelario de

mia edzo tute verda, grandaj vitraj pordoj (ĉiam fermataj + kun dika kurteno pro la klientoj), la atendejo kiu kondukas al la ĝardeno ankaŭ tute ruĝ-bruna, la kuirejo tute ĉ-blanka. Malgranda loko por pendigi vestojn + sin purigi manojn. 1<sup>o</sup> etaĝo, sur la strato mia dormĉambro kun balkono 2 fenestre, tute blua. Banĉambro blanka + rosa. Malantaŭe sur la ĝardeno, salono + malgranda salono aŭ mia buduaro ambaŭ verdaĉ hele + rozaj + fumejo + malgranda fumejo ambaŭ bluj. 2<sup>a</sup> etaĝo, dormĉambro de mia filo sur la strato + la arkivejo (super la banĉambro) kie mia edzo konservas siajn aferojn finitajn (10 000) + la paperejo por li. Sur la ĝardeno alia dormĉambro. 3<sup>a</sup> etaĝo, granda biliardĉambro kiu okupas la tutan longecon de la domo + la ĉambro de la servistino sur la strato + verda hele. Ekzistas ankaŭ sur la ĝardeno 2 etaĝoj da tegmento kie ni oftis iras vespere por aŭskulti koncertojn. La vidaĵo malantaŭe estas mirinda sur la kamparo + sur la maro. Antaŭe sur la strato estas larĝa bulvarado kun grandaj arboj. Nun, kara amiko, vi povas imagi mian hejmon (kiu apartenas al ni + estis konstruita por ni, preskaŭ) + vidi kiel mi estas okupata pri ĝi. Nuntempe, mi ŝanĝas kurtenojn, pentraĵon, paperan kovraĵon por la meblaro k.t.p. en la fumejo + de post la milito ĉio estas tiel malfacile pri la laboristoj. Mi ĵus faris grandegan lampŝirmilon en la salono 0 m 80 da diametro. Ili kostas 500 F por aĉeti + al mi ĝi kostas 150 F. Mi havas krom la grandaj necesaj lumoj, multe da malgrandaj lumoj kiujn mi ŝatas + povas meti ien ajn (elektre). Ni havas la gazon ankaŭ.

Kiom da detaloj vi ekkrios. Ne legu se ili ne interesos vin. Kiam mi komencas, mi ne povas halti.

Kion vi pensas pri la brigando, la diktatoro Mussolini ? Li estas vigla energia konduktoro da homoj, sed ĉu vi ne <sup>1</sup> opinias ke estas krime agi kiel li ? Konstitucio estas la plej alta povo en la lando + li renversis ĝin preskaŭ + ne respektas la Parlamenton. Post 3 aŭ 4 monatoj, aliaj partioj povus agi same + rekomenci !!! Via samlandano, S<sup>ro</sup> Ŝibrava el Znojmo kiu estas profesia sekretario de politika partio estas tre akraĉ pri S<sup>ro</sup> Mussolini. Mia edzo ankaŭ kunsentas kun mi + kun S<sup>ro</sup> Sibrava.

La Boulogna haveno kiun vi vidis en la 3 Mousquetaires ne estas Boulogno. D' Artagnan, en la historio, forlasis Francujo de Boulogno sed en la filmo estas tute alia haveno.

Ĉu vere ekzistas Cinema en Pŕelouĉ? Ekzistas 2 filmoj "La 3 Mousquetaires", Amerika kiu daŭras nur 3 horojn + Franca kiu havas 12 episodojn. Mi vidis tiun lastan + trovis ĝin tre interesa – precipe la vizaĝon de D'Artagna kvankam iom virina.

Lundon, 4-12-22 15h

Mi ne povis fini hieraŭ ĉar mi devis tagmanĝi ĉe mia frato + nova bo-fratino. Posttagmeze, mi iris retrovi mian edzon sur la "golf" ludejo kie li ludis de post 9<sup>a</sup> matene.

Eble vi legis en lasta N<sup>o</sup> de Esp. en "Laŭdoj" ke Ge<sup>roj</sup> Sergeant dankas la grupon de Mulhouse por afableco dum ilia vojaĝo. Mi skribis sia. Devas esti sia ĉu ne? Rimarku almenaŭ 3 au 4 samerarojn kiujn certe la redaktoro ŝanĝis ĉiam en "Oni laŭdas". "S<sup>ro</sup> X dankas S<sup>ro</sup> Z por helpo dum sia vojaĝo". Ŝajnas al mi ke certe estas sia + ne ilia, + al vi ? Ili ne rajtas ŝanĝi. Mi en tiu sendaĵo skribis Alsaco + ili ŝanĝis + metis Elsaco (radiko boŝa). Mi malkontentiĝas.

<sup>1</sup> *Noto supre sur la paĝo 4:* Pardonu tiun malsimilan paperon sed mi ne volas supreniri por preni la alian. Dankon.

Mi ne scias ĉu mi povos skribi de nove antaŭ Kristnasko + Nov' Jaro. Se ne bonvolu akcepti ĉiujn plej sincerajn dezirojn por tiu festo + por 1923. Ke tiu jaro alvenonta nur alportu al vi feliĉon + sanon. Al vi + al la Viaj. Estu feliĉa ĉiam + dankon por via amikeco + por via simpation. De nove dankon por la eltrovo de adreso de S<sup>ro</sup> Varzaly.

Mi sendas kelkajn P.M por via amiko.

Dankon por via ŝatinda letero.

Amike via

Acie Sergeant